

BRAZILA ESPERANTISTO

64-a Jaro

MAJO-JUNIO 1970

N.º 674-675

Oficiala organo de **Brazila Esperanto-Ligo**, Societo de publika utileco (dekreto N. 4356, 26 Oktobro 1921). Jarabono eksterlande: 15 respondkuponoj.

Sidejo: **Praça da República, 54, 2.º** — Telefono: 242-4357 — RIO DE JANEIRO — BRAZIL

Respondeca redaktoro (redaktor principal): **D-ro Carlos Domingues**

PINDAMONHANGABA - SÃO PAULO



Komunuma Kurso de Esperanto — Disdono de Diplomoj. Sidantaj, de maldekstre dekstren: S-ro Miguel Rodrigues, S-ro Emílio A. Beringhs (de la radistacio "Difusora de Taubaté), D-ro Angelo Paz da Silva (prezidanto de la Urbkonsilantaro), S-ino Hilda César (prezidantino de la urba Beletristika Akademio, D-ro Waldomiro B. de Abreu (direktoro de la Kurso), Majoro G. A. Silva Velho, S-ro Nilson de Almeida Moura (prezidanto de Norda Princino E.K.), S-ro Sírío Silva.

Teksto en Brazila Kroniko.

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

Assembleia Geral Ordinária

Em 25 de Abril de 1970, às 17 horas, em sua sede, na Praça da República 54, 2.ª., no Rio de Janeiro, reuniu-se, em sessão ordinária, a Assembleia Geral da Liga Brasileira de Esperanto, convocada na forma dos Estatutos. A sessão foi presidida pelo Dr. Carlos Domingues, Presidente da Liga, e secretariada pelos Primeiro e Segundo-Secretários, respectivamente, Engenheiro Floriano Pessoa e Dr. Joel Vasques Manso. Compareceu número regulamentar de sócios, inclusive representantes das seguintes instituições filiais: Associação Baiana de Esperanto, Campos Esperanto-Klubo, Centro Esperantista de Santos, Paraná Esperanto-Asocio, Brazila Klubo Esperanto, Pernambuco Esperanto-Asocio, São Leopoldo Esperanto-Klubo, Norda Princino Esperanto-Klubo e Ribeirão Preto Esperanto-Klubo.

O 1.º Secretário leu a ata da sessão anterior, a qual foi aprovada sem discussão. Pelo 2.º Secretário foi feita a leitura do Relatório do Presidente referente às atividades da Liga no ano de 1969, e, pelo 1.º Secretário, a leitura do Balanço da Tesoureira, de 1969, sendo ambos os documentos aprovados por unanimidade. A Assembleia aprovou, ainda, voto de pesar pelo falecimento do eminente esperantista e consócio, Antonio Caetano Coutinho, ocorrido a 15 de Fevereiro de 1970. Lembrou o proponente, Cel. Jorge Campos de Oliveira, alguns feitos do pranteado no movimento esperantista, como membro honorário da U.E.A. e como diretor do "Brazila Esperantisto", durante anos. Descreveu, também, algumas de suas obras, inclusive traduções. A Assembleia pôs-se de pé, em seguida, em silêncio de um minuto. O Presidente agradeceu a presença de todos e encerrou a sessão.

GALILEO GALILEI

Scienca kaj Morala Valoroj de L'a Verko

Conferência do pensador Benito de Jesus Caraça. Trad. de Manuel de Freitas. Contém um original gráfico das escolas filosóficas Cr\$ 3,50

QUOTA ANUAL DE ADESAO A LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

(De acôrdo com os Estatutos todos os membros são automaticamente filiados à organização mundial)

Membro simples: recebe a carteira de sócio, os cupões de serviço e o "Brazila Esperantisto"	15,00
Membro com direito ao Anuário: recebe o mesmo que o antecedente e mais o Anuário do movimento esperantista	40,00
Membro Assinante: recebe o mesmo que o antecedente e mais a revista "Esperanto"	60,00
Membro Mantenedor: recebe o mesmo que o Membro Assinante	90,00
Patrono: recebe o mesmo que o Membro Assinante e paga 10 vezes a quota deste.	
Membro Vitalício: recebe o mesmo que o Membro Assinante e paga 20 vezes a quota deste.	

Tôdas as importâncias devem ser remetidas em cheque pagável no Rio de Janeiro à

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO
PRAÇA DA REPÚBLICA, 54, 2.º
Rio de Janeiro, GB

Kalocsay, Waringhien, Bernard

PARNASA GVIDLIBRO

A métrica em Esperanto —
A arte poética — Dicionário de rimas — 2.ª edição . Cr\$ 14,00

Brendon Clark

KIEN LA POEZIO?

Princípios — Poemas originais e traduzidos — Sônimos Cr\$ 15,00

LIBRO "ESPERANTO EN KOMERCO"

Raportoj de 100 firmoj kaj organizacioj el 40 landoj pri spertoj kun Esperanto. Ĉiu raporto en lingvoj Esperanto, angla, franca, germana, hispana, 100 paĝoj. Bonega varbilo. Esperanto-Rondo-Crailsheim-Germanujo. Prezo ĉe B.E.L.: CR\$ 4,00.

LA ESPERANTA LITERATURO

Ĉiu vivanta lingvo posedas literaturo, kaj ambaŭ havas sian influon sur la alia. La Internacia Lingvo ne estas escepto en tiu senco. Esperanto posedas tre ampleksan literaturo, kiu kreskas ĉiun tagon speciale dum la lastaj jaroj. Rimarkinde tamen estas, ke la poezio pli floras ol la prozo, ke la eldonistoj aperigas pli da poemaroj ol romanoj kaj novelaroj kvankam la granda publiko pli ŝatas la lastajn.

Auld disdividis la Esperantan poezion en tri epokojn: primitiva romantismo (antaŭ 1919), polurita romantismo (inter la du mondmilitoj) kaj metafiziko (post 1945). Tian disdividon oni ne povas fari por la prozo. La limoj inter la periodoj ne estas tiel fiksj, speciale dum la jardekoj antaŭ la dua mondmilito.

La unua verkisto, kiu skribis esperantlingvan romanon, estis Henri Valliene. Lia "Kastelo de Prelongo" aperis en 1907; temas pri iom pezstila romantika amhistorio de ne tre alta lingvonivelo. Pli konata estas Henrich Luyken, kies verkoj "Stranga heredaĵo" kaj "Pro Istar" ankoraŭ figuras en la listo de multelegataj libroj. Preĉipe la lasta estas tre interesa historia romano el la antikva Babelo. Ekzistis pluraj aliaj verkistoj, kies libroj nun ne plu estas tiel konataj.

Tradukoj de prozo pli abundas. Jam Zamenhof mem publikigis tradukitajn librojn de famkonataj verkistoj kiel "La batalo de l'vivo" de Dickens kaj "Fabeloj" de Andersen, por nur mencii du. Krom tio ankau la aliaj pioniroj de la literaturo, kiel Grabowski kaj Kabe, aperigis tradukitajn verkojn. En tiu epoko speciale en Rusujo vivis pluraj bonaj tradukistoj.

Figuro transira inter la pionira epoko kaj la pli moderna tempo estis H. Bulthuis, nederlandano, kiu krom originalaj romanoj ("Idoĵ de Orfeo", "La vila mano") ankau tradukis plurajn verkojn, kvankam ne ĉiam tre altkvalitaj. Tamen, vere grandaj nomoj ne aperis ankoraŭ en tiu tempo.

Post la jaroj de ĉirkaŭ 1920-1925 komencis aperi en la Esperanta firmamento aliaj verkistoj, kies stiloj estas

pli "modernaj" kaj kies lingvouzo atingas pli altan nivelon.

La unua menciinda nomo estas tiu de Julio Baghy, ne nur konata poeta, sed ankau lerta prozoverkisto. Lia unua romano, originale verkita en Esperanto, estis "Viktimoj" jam aperinta en 1925. Poste aperis "Sur sanga Tero", alia granda verko, eĉ pli bona ol la unua. Baghy ankau estis novelisto, publikigis novelarojn kiel "Dancu mario-netoj", "Migranta plumo" kaj "Teatra korbo". Satiroj bonhumoraj kolektigis en "Verdaj donkijotoj", karikaturoj pri la Esperanta "familia rondo".

Alia verkisto estis Jean Forge, kies plej konata romano ankoraŭ estas "Mister Tot aĉetas mil okulojn", sed kies romanoj "Abismoj" kaj "Saltego trans jarmiloj" estas pli altnivelaj. Raymond Schwartz okupas specialan lokon, ankau en la listo de prozoverkistoj kaj Stellan Engholm estis krom verkisto de originala prozo (ekzemple: "Infanoj en torento") ankau lerta tradukisto (ekzemple: "Gösta Berling" de Selma Lagerlöf kaj "Kon-Tiki" de Heyerdahl).

Aparta mencio meritas Ivo Rotkovic, jugoslavo, kiu en sia traduko de "Cezaro" de Jelusic, vere jonglas kum la lingvo ĝis ĝiaj ekstremoj. Lia freŝdata traduko estas "Tragedio en la universo", kiu kaŭzis eĉ severan kritikon pro tiu jonglado.

El la modernaj prozoverkistoj ni povas mencii plurajn nomojn. Reto Rossetti estas konata per "El la maniko", kaj lia frato Cezaro Rossetti kun la bonhumora "Kredu min, Sinjorino". Krom tio, la norvego J. H. Rosbach publikigis plurajn originalajn verkojn ("Bagatelaro", "Homoj kaj riveroj"). Alia el la plej elstaraj figuroj estas la antaŭ nelonge mortinta Ferenc Szilagyi, ĵurnalista noveloverkisto ("Inter sudo kaj nordo", "Koko krias jam", k.t.p.). Kompreneble ekzistas pluraj aliaj verkistoj, kiuj skribis bonajn verkojn, sed ni ne povas mencii ilin aparte.

Ankaŭ pli nuntempa estas la scienca "literaturo". La plej bone konataj nomoj en tiu speco estas tiuj de

Brazila Kroniko

CEARÁ

Fortaleza — La Tago de Unuĝintaj Nacioj (24-a de Oktobro) estis celebrata en la Federacia Universitato de Ceará per la prezentado en la Rektorejo de ekspozicio por la publiko, organizita de la kursoj de lingvoj germana, hispana, franca, angla, itala kaj Esperanto. La E-kurso prezentis diversajn afiŝojn kun vortoj rilataj al U.N. kaj al Internacia Lingvo. La Universitato kaj la librovendejoj "Assunção" kaj "Renascença" disdonis flugfoliojn pri la Tago kaj pri Esperanto.

RIO GRANDE DO NORTE

Natal — La ŝtata Publika Biblioteko inaŭguris en la 30-a de Decembro lasta bibliografian ekspozicion memorigan pri la 71-a jaro de naskiĝo de Luís da Câmara Cascudo, al kiu ĝi invitis Brazilan Esperanto-Ligon. La konata verkisto, kiun ni gratulas, estas granda amiko de Esperanto.

PERNAMBUCO

Recife — S-ro Miguel de Arruda Câmara, radiamatoro el la antaŭurbo Ibura, komunikis al B.E.L., ke li lernas E-on kun siaj kolegoj S-roj Francisco Alves Mata (Maceió), Nid Dutra d'Amorim (Salvador) kaj Geraldo Pires Sidonio (Caruaru, PE). La radiamatoroj faras ĉiam bonan gratulindan laboron. S-ro Arruda Câmara jam aliĝis al nia Movado kaj espereble fariĝos Fakdelegito por Radiamatorismo en sia urbo.

ALAGOAS

Maceió — Kolonelo Francisco Alves Mata (PY-7-IY, Rua Artur Vital da Silva 77, Gruta de Lourdes) instruas

Paul Neergaard kaj Ivo Lapenna. Sed ĉi tiu temo estas ĉapitro en si mem, kaj ni ne povas eniri en detalojn ĉi tie.

Jannes Markus Mabesoone

(Disertacio farita en Profesora Ekzameno)

E-on kun granda entuziasmo al siaj kolegoj radiamatoroj. Li havas plurajn lernantojn en diversaj ŝtatoj.

BAHIA

Salvador — Esperantista Radiamatora Bulteno, eldonata de nia samideano Ingeniero Nid Dutra d'Amorim (Rua Jardim Guadalupe 10, Acupe de Brotas), aperigas interesajn informojn pri Esperanto ĉe la radiamatoroj. Certe ĝi povos vige influu por divastigo de nia afero en tiu grava medio, kie ni jam kalkulas multajn bonajn amikojn.

SÃO PAULO

Monte Aprazível — La 29-an de Septembro lasta komenciĝis kurso de Esperanto en Instituto Estadual de Educação "Capitão Porfírio de Alcantara Pimentel". Vizitas la kurson ĉirkaŭ 45 gelnantoj. La ekziston de tiu kurso ni ŝuldas al la estrino de la Instituto, Prof-ino Ruth de Carvalho Ceneviva, kiu invitis Prof-on Benedicto Silva instrui Esperanton kiel oficialan eksterordinaran lernejan aktivecon. Kun plezuro ni sciigas, ke la patro de la estrino estas nia kara amiko kaj malnova samideano S-ro Constantino de Carvalho. Ni kore salutas ambaŭ.

Pindamonhangaba — Norda Princino Esperanto-Klubo elektis en la 18-a de Oktobro sian unuan estraron, konsistantan el jenaj anoj: Prez. S-ro Nilson Almeida de Moura, Vicprez. Prof. Benedito Marques Monteiro, Ĝen. Sek. Prof-ino Ana Regina Salgado de Macedo, 1-a Sek. S-ino Maria Hilda Goffi Salgado, 2-a Sek. S-ro Guilherme Schmidt F.^o, Kas. S-ro Francisco Santiago Neto, Bibl. S-ro Luiz Molinari.

— B.E.L. aprobis la Statuton de Norda Princino E. K.

— La 15-an de Februaro okazis en la aŭlo de la Urba Konsilantaro la dono de elementaj diplomoj de Brazila Esperanto-Ligo, aljuĝitaj laŭ la komunuma leĝo n-ro 285 de la 20-a de Junio 1956, al la lernintoj de la Komunuma Kurso. La 19 diplomoj estas subskribitaj de la Urbestro D-ro Caio Gomes Figueiredo, de la Prezidanto de B.E.L. D-ro Carlos Domingues kaj de la Direktoro de la Kurso Prof. Waldomiro B. de Abreu. La gvidanto de la Elementa Kurso, S-ro Luiz Molinari, ricevis Superan Diplomon. Ĉeestis eminentaj personoj de la urbo kaj espe-

rantistoj el pluraj lokoj de la regiono. La paroladoj de la patrono, Kolonelo Jorge Campos de Oliveira, de la reprezentanto de la lernintoj, D-ro Wilson Valentini, kaj la aliaj paroladoj estis disradiitaj de la loka *Rádio Difusora*. La brila soleno efikis en la tuta grava regiono, kie baldaŭ Norda Princino E. K. malfermos novajn kursojn.

Presidente Bernardes — Laŭ komuniko de S-ro Antonio dos Santos Costa estas fondita E-kurso, kies gvidanto li estas.

Ribeirão Preto — S-ro Manoel Moacir Siscatti, nia Vicdelegito kaj Fakdelegito pri Edukado, komencis gvidi E-kurson ĉe Ginásio Espírita Apóstolo Paulo, kies direkcio tre favoras nian lingvon.

— Ribeirão Preto E. K. okazigis en la 30-a de Aŭgusto posttagmeze kunvenon honore al D-ro José de Freitas Ramos, Vicprezidinto kaj nuna Gen. Sek. de la klubo. Paroladis pluraj klubanoj.

— Invitita de Centro de Studoj kaj Meditadoj Yogi de Suddha Dharma, S-ro José Pedro Miranda, ĵurnalisto kaj Delegito de U.E.A., faris en la 8-a de Oktobro interesan paroladon pri la temo: "De Babelo al Bialistok".

— En kunsido okazinta la 13-an de Dec. lasta estis enoficigita la estraro de Ribeirão Preto E. K. por 1970.

— S-ro José Pedro Miranda verkas regule interesajn artikolojn pri Esperanto en la ĵurnalo *A Cidade*.

PARANÁ

Jandaia do Sul — Nia samideano el Apucarana S-ro Ennio José Toniolo faris serion da prelegoj pri la problemoj de la internacia lingvo al siaj lernantoj de Lingvistiko en la Fakultato de Filozofio. La lernantoj ekkonis diversajn gazetojn kaj librojn publikigitajn Esperante en pluraj landoj. La preleginto intencas fari samajn lecionojn en la Fak. de Filozofio de Mandaguari.

RIO GRANDE DO SUL

Porto Alegre — Kun bildoj de Zamenhof, Gandhi kaj de D-ro Ernani Dias Corrêa, Prez. de Esperantista Societo de Porto Alegre, la ĵurnalo *Folha*

55.º CONGRESSO UNIVERSAL DE ESPERANTO

O 55.º Congresso Universal de Esperanto, promovido pela Associação Universal de Esperanto, realizar-se-á em Viena, Capital da Áustria, de 1.º a 8 de Agosto do corrente ano.

É Alto Protetor do Congresso o Dr. Franz Jonas, presidente da República Austriaca e também esperantista ativo.

Do programa constam, entre outros números, a Universidade Internacional, peças teatrais em Esperanto, filmes, reuniões da Comissão Diretora da Associação Universal de Esperanto, da Academia de Esperanto, das associações de médicos, juristas, jornalistas, etc. e excursões.

A Liga Brasileira de Esperanto estará representada por Delegado designado pelo Ministério das Relações Exteriores.

da Manhã (12-12-69) publikigis traŭan intervjuon kun ci tiu lasta pri la Internacia Lingvo.

— E.S.P.A. elektis sian estraron por la periodo 1970-71: Prez. D-ro Ernani D. Corrêa, Vicprez. D-ro M. Belmonte de Abreu, 1-a Sek. Prof. Ary Zamora, 2-a Sek. S-ro P. Isaias Ereno, Kas. S-ro G. Meinhardt, Bibl. D-ro A. Cardia.

Rio Grande — En kunsido okazinta la 15-an de Dec. lasta Esperanto-Societo de Rio Grande elektis sian estraron por la jaro 1970.

Brazila Esperantisto petas al la estraranoj de la brazilaj kluboj kaj al la brazilaj delegitoj de U.E.A., ke ili sendu raportojn pri siaj informaj kaj instruaj laboroj.

GRUPOS ESPERANTISTAS

Pode filiar-se ao Movimento o grupo esperantista que preencha estas condições:

- aceitar os estatutos da B.E.L.;
- ter os seus estatutos aprovados por esta;
- nela inscrever todos os seus sócios.

NOVAJ STRATO KAJ PLACO

RIO GRANDE - RS

En Rio Grande, grava urbo de Stato Rio Grande do Sul, ekzistas nun Strato "Dr. Lazaro Ludoviko Zamenhof" kaj Placo "Esperanto". Ĉi tiuj omaĝoj al la Internacia Lingvo estas ŝulditaj al la laboro de Esperantista Societo de Rio Grande.

Ĉi-sube ni transskribas la tekston de la du leĝoj:

GENERAL ARMANDO CATTANI, Interventor Federal do Município de Rio Grande, usando das atribuições que me confere a Lei Orgânica em seu artigo 62, inciso II,

Faço saber que a Câmara Municipal aprovou e eu sanciono a seguinte Lei:

Art. 1.^o — Fica o Executivo Municipal autorizado a dar a denominação de "Dr. Lázaro Ludoviko Zamenhof" a uma das vias públicas do Parque Residencial Salgado Filho, numa justa homenagem ao ilustre fundador do idioma Esperanto.

Art. 2.^o — Revogam-se as disposições em contrário.

Prefeitura Municipal de Rio Grande, 23 de Janeiro de 1968.

Gen. Armando Cattani
Interventor Federal

WALTER CHAVES TROINA, presidente da Câmara Municipal de Rio Grande, usando das atribuições que lhe confere o inciso 24 do Art. 30.^o, combinado com o Art.^o 38.^o da Lei Orgânica,

Faz saber que esta decreta e promulga a seguinte lei:

Art. 1.^o — Fica o Executivo Municipal autorizado a dar a denominação de "Praça Esperanto", à praça sem denominação existente no centro do núcleo residencial em execução na parte Sul da cidade e denominado Vila do Lar Gaúcho.

SOCIA VIVO

GEEDZIGO

Nia samideano Mauricio Fernandes de Castro, tradukisto kaj Administrista Sekretario de Universitato de Puraue, en Viçosa, edzigis kun F-ino Yeda Xênia Sant'Ana, biologistino kaj profesorino de la Universitato de Minas Gerais, en Belo Horizonte la 6-an de Januaro. Sinceran gratulon!

NEKROLOGO

Germano Meinhardt

En Porto Alegre forpasis en la 19-a de Marto nia samideano S-ro Germano Meinhardt, kiu dum kelkaj jaroj eike kaj akurate penumis la postenon de kasisto de Esperantista Societo de Porto Alegre.

Milton Paulino dos Santos

Nia samideano S-ro Milton Paulino dos Santos mortis en Rio de Janeiro la 15-an de Marto. Li estis membro de Brazila Klubo Esperanto, kies kunvenojn li ofte ĉeestis, havis diplomon de B.E.L. kaj gvidis E-kursojn en la urbparto de sia loĝejo, Padre Miguel. Vizitante Belo Horizonte li disvolvis bonan aktivecon por la disvastigo de Internacia Lingvo. Li estis raditelegrafisto de la Mararmeo kaj lasttempe fariĝis F.D. por klimatizo.

PARA APERFEIÇOAMENTO

William Auld

PAŬOJ AL PLENA POSEDO

Progresiga legolibro de
Esperanto kun lingvaj
ekzercoj Cr\$ 16,00

Art. 2.^o — Revogam-se as disposições em contrário.

Câmara Municipal de Rio Grande, 23 de Dezembro de 1969.

Walter Chaves Troina
Presidente

Aperfeiçoe o seu Conhecimento

Komparu vian tradukon kun la nia, kaj eliru instruon per esploro de la diferencoj.

LA VOJAĜANTA HUNDO

Carlos Drummond de Andrade

Mi raportis la aferon al hundo, kun kiu mi rilatas, nomata Puck, kaj li faris kun mi per la okuloj kaj saltetanta vosto la jenan dialogon preskaŭ majeŭtikan, kvankam inverse.

— Estis kvar kofroj, laŭ vi diras?

— Efektive, mia kara Puck.

— Supozeble neatentindaj kofretoj...

— La novaĵo ne mencias, sed mi supozas, ke ili estis konsiderindaj kofroj.

— Kaj per tio vi volas duondiri, ke vojaĝanta hundo ne rajtas kofron.

— Ne ĝuste tiel. Ŝajnas al mi, ke la pakajo estis tromulta por vojaĝanto nature tiel sobra, kiel — ne pro via ĉeesto — mi konsideras la hundon.

— Kaj kiom da kofroj la mondu-mula havis? Ĉu kvardek?

— La gazeto ne diras, sed kredeble li kunprenis multajn.

— Ĉu vi opinias juste, ke viro vojaĝas kun kvardek kofroj (mi hipotezas) kaj lia hundo ne rajtas ek kvar?

— Sed pripensu, Puck, la homo estas komplika besto, kiu deĝis de la naturo. Li partoprenas vesperajn festojn, kiuj postulas specialan veston; ĉeestas kunvenojn pri negoco, sporto, amo, milito. Acetas librojn kaj ek ilin legas. Bezonas tapiŝojn, aŭtomobilojn, sondiskojn, ungvernison kaj cion, kion vi, pli feliciaj, ankoraŭ ne konas, aŭ ma ŝatas.

— Ĉu tiuj aferoj estas necesaj por la vivo?

.....

— Mi vidas, ke vi tute partianiĝis al via specio kontraŭ la mia, kvankam la du interrilatis amike dum jarmiloj.

— Vi eraras, mia kara... Tia tuta zorgo al hundo, al simpla hundo (ni ja estas simplaj, kaj tiu estas nia plej granda virto), montras, ke la homo ne estas tute perditita, kaj jam komencas percepti, ke ekzistas la proksimulo. An-

AKADEMIO DE ESPERANTO

OFICIALA KOMUNIKO

La 10/III/1970 okazis elektoj por renovigo de la triono de la Akademio. Vakis, pro morto aŭ eksigo, 3 postenoj. El la elirantaj membroj ciuj estis reelektitaj, krom S-ro Cseh, kiu de ses jaroj ne plu partoprenis en la laboroj de la Akademio. Estis do elektitaj kvar novaj Akademianoj: d-ro I. Chiussi, la tradukinto de *La Nobla Korano*; d-ro G. Mattos, la konata brazila verkisto; d-ro V. Sadler, la redaktoro de *Esperanto* kaj de *La Monda Lingvo-problemo*; kaj mag. J. Wells, la aŭtoro de la plej moderna vortaro angla-Esperanta kaj Esperanta-angla.

La aĉetontoj de la *Aktoj de la Akademio* trovos en tiu broŝuro la statuton de la Akademio, adresojn kaj biografiajn indikojn de ĝiaj membroj, kaj, sub formo de enmetita kromfolio, ĝian nunan konsiston post la ĵusa balotado.

La Prezidanto de la Akademio
G. Waringhien

KATALOGO DE ELEKTITAJ LIBROJ EN ESPERANTO

Livro ilustrado, interessante para leitura e muito próprio para presente e propaganda.

Documento valioso para prova da vitalidade do Esperanto e de sua literatura Cr\$ 3,50

koraŭ li tenas la okulojn malsupren, kaj atentis nur kelkajn el ni, kun pli grava devenlinio. Morgaŭ li malkovros la infanetojn, kaj venos tago, k.am...

Elportugaligis G.P.

—x—

Os leitores que desejarem corresponder-se sobre a tradução, queiram dirigir-se diretamente ao tradutor: Gen. Geraldo Pádua, R. Ouro Preto 1161 ap. 202, Belo Horizonte.

RECENZO

Ivo Lapenna — ELEKTITAJ PAROLADOJ KAJ PRELEGOJ (Suplemento al *Retoriko*) — Eldono de la aŭtoro, Rotterdam — 21cm × 15cm — 152 paĝoj — Prezo ĉe la libroservo de B.E.L. Cr\$ 22,00.

Temas la libro pri kelkaj paroladoj kaj prelegoj elektitaj de la aŭtoro, kiuj estas, ĝustadire, aldono al lia tre konata libro *Retoriko*. Verkitaĵ antaŭ kelkaj jaroj tiuj oratorajoj estas june freŝaj, ankoraŭ nuntempaj kaj aktualaj.

Verko de D-ro Ivo Lapenna (precipe prelego) estas unuaranga legaĵo por ĉiuj, kiuj sin titolas amanto de la Esperanta literaturo. Ĝi estas vera juvelo kaj por la okulo kaj por la orelo. La stilo, la lerteco kaj kapableco de la verkisto, permesas ke la enhavo de la libro nin levu al supraj konsideroj pri la historio de la Esperanta movado. Meditinda legaĵo, forta skuo en ĉiujn "verdstelulojn".

Kompreneble, krom la esprimojn de oratora spertulo, ni nepre atentu la problemon de intermiksado de aferoj strangaj al la lingvo, de apartaj kaj paralelaj movadoj sin alkroĉantaj al la esperanta ĉaro. Tiujn instruojn ni rimarku al ni serioze.

Tiaj aluĵoj — kaj kelkfoje rektaj ri-proĉoj — abundas en la libro, kiu estas, entute, senkondiĉe ĝuinda.

MEMKRITIKO (Poemaro) — Redaktis Victor Sadler — Eldonejo Koko — 17,5cm × 12cm — 60 paĝoj — Prezo ĉe la libroservo de B.E.L.: Cr\$ 11,00.

Unu tagon, bibliotekisto de U.E.A. trovis (hazarde) en unu el la tieaj tirkestoĵ amason da paperfolioj: poemoj estis la enhavo. Prenante la foliaron, li vane serĉadis la aŭtoron. Kiu estas la poeto? Kia li estas? Neniu scias. Subtilaj esploroj sin montris superfluaĵ. Neniu kohereco en la poemaro; neniuj postsignoj; neniuj indicoj. Neniu.

El la naŭdek-ok poemoj, Victor Sadler, la bibliotekisto, prenis tridek-ses kaj faris el ili libron. La titolo venis el la enhavo, ĉar ĝi estas tre personeca, kvazaŭ biografio.

Nun, mi pensas, la aŭtoro ridetas pro feliceco. Ne ĉiam oni vidas anoni-

ESPERANTO NO ESTRANGEIRO

MADAGASCAR — Acaba de ser fundado o Instituto Malgaxe de Esperanto, como instância lingüística nos moldes dos demais institutos de Esperanto no mundo. Terá como objetivos principais assegurar a unidade da língua e controlar o ensino do Esperanto em Madagascar.

POLÔNIA — Representantes de doze famílias em que o Esperanto é usado como segunda língua reuniram-se naquele país para discutir sobre suas experiências. O encontro foi acompanhado em toda a sua realização pela Faculdade de Pedagogia da Universidade de Torun que enviou um representante.

Teatro de Machado de Assis
(quatro comédias em Esperanto 4,00

Amor por Anaxis, Arthur Azevedo. Texto em português e Esperanto. No mesmo volume provérbios correspondentes nas duas línguas 5,00

man verkon presita. Li ne bezonis alglui sian nomon al la poemoj por alvoki simpatian kaj aplaŭdon.

Ĉu li pravas? Ĉu pravas la redaktinto? Jen specimeno:

92. "En pli junaj jaroj/min turmentis la maleblo/ vin imagi;/ mi maturiĝis;/ kaj la vizaĝo misprojekciita,/ fuŝe pastelita,/ nek revenas, nek/ min forlasas".

91. "Kursive mi parolis, miaj infanoj,/ por la romaj krampoĵ de viaj oreloj,/ arte grafikis sur la blankaj paĝoj de viaj koroj,/ jen la enigmojn asteriskis,/ jen eksplikis per manoj pedagogaj/ aŭ paciencis, per rideto plenigante spacon./ Neniu fermas miajn parentezojn./ Laciĝas mia voĉo, al si mem responda."

Amaso da poemoj lasita en tirkesto... kaj nun por vi.

Joel Manso